

# Horizon-taal

Jaargang 48 - nummer 278

maart - april 2016



[www.esperanto.be](http://www.esperanto.be)

**Met steun van de Vlaamse Gemeenschap**

# INHOUD

Ten geleide	3
La tezo de la hind-eüropa lingvo (2)	3
La senglora receso de la Valona lingvvo	5
De Duitstaligen vaak vergeten	6
Esperanto por via sekureco dum la flugo	6
La skarlata armilo	7
Hector Hodler, lia vivo kaj verko	8
De taal en de stijl van Zamenhof (2)	13
Seslingva konversacia libro	7
Mooi weer vandaag, nietwaar?	15
Ŝekspiro en Esperanto	17
Clubprogramma's	19

**Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.**

47ste jaargang - maart-april 2015

Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

**Redactie en administratie:** Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be  
webstek: <http://www.esperanto.be/fel/nl>

**Abonnementen:** 25,00 EURO

**Rekeningen:** t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen  
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB  
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

**Redactie:** Pieter-Jan Doumen

**Tekstopmaak:** Eriko D'Hondt

**Medewerkers:** Marc Cuffez, Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Jean-Pierre Van den Daele, Emiel Van Damme, Kris Panis, Mireille Storms, Ivo Vercammen e.a.

**Verantwoordelijke uitgever:** Pieter Jan Doumen, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

**Advertentietarieven:** (alle prijzen zijn in euro)

\* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar  
BTW-tarief van 21% op deze tarieven.

	1-malig	3-malig*	6-malig*
formaat 1/1	257	625	1000
formaat 1/2	150	375	600
formaat 1/3	110	275	440
formaat 1/4	80	200	320
formaat 1/8	55	140	220
formaat 1/12	30	75	120

Beste Lezers en Lezeressen,

Voor u ligt het 278-ste nummer van *Horizon-taal* met interessante lectuur en belangrijk nieuws. Op 6 januari kocht de Vlaamse Esperantobond in Antwerpen een huis voor 239.000 euro ter vervanging van het vertrouwde huis in de Frankrijklei, dat onze vereniging huurde van het Instituut Hodler '68. Daar de huurovereenkomst eindigt op 31 december van dit jaar en FEL het huis niet kan kopen wegens de hoge vraagprijs, moet onze vereniging het huis verlaten. Ons 'nieuwe' huis ligt in de Lange Beeldekensstraat op het nummer 169 op enkele kilometers afstand van de Frankrijklei.

Pieter Jan Doumen, Hoofdredacteur.

## LA TEZO DE LA HIND-EÜROPA LINGVO (2)

Sed kie vivis la hind-eŭropanoj?

La germanistoj de la antaŭa jarcento kredis, ke temas pri ia origina norda raso. El tio ekestis kampanjo de arheologaj serĉadoj financata de Himmler. Ekde tiu momento oni serĉis pli oriente. En Ukrainio oni malkovris la spurojn de la neolitika civilizacio «kurgana», kiu pli konvenas. Sed kiu kuraĝus pruvi, ke nia hipoteza kurgana prapatro nomis «guow» la animalon, de kiu li tiris ĉiumatene bonan glason da lakto?

Tial la franca arheologo Jean Paul Demoule dubas pri la ekzisto mem de la hind-eŭropanoj, kaj do ankaŭ pri ilia lingvo. Laŭ li la diverĝo de la lingvoj devis okazi multe pli frue ol ĉiu konata historio, kio faras malverajsajna la malkvron de tekstoj kiuj povus subteni tiun tezon: «La tri plej antikvaj pruvitaj hind-germanaj lingvoj – la sanskrito de la veda, la micena kaj la hitita, kiuj estis parolataj plej frue ĉirkaŭ la jaro 1500-a a.K., jam estis tiel for malproksimiĝintaj unuj de la aliaj, ke ilia separo certe okazis plurajn dekojn da jarcentoj pli frue.»

La genealogia arbo de lingvistika familio supozigas, ke oni povas rekonstitui homajn grupojn inter la origina tribo kaj la pruvitaj branĉoj: la slava, balta, germana, kelta, greka, hind-irana, hitita kaj itala. Estas kurioze konstati ke ĉi tie, tute kiel por la evolucio, oni ĉiam serĉas mankantan ĉeneron, kiun oni neniam trovas. Tiel, dum la lastaj du jarcentoj, oni povis fari neniu pašon en tiun direkton. Eĉ la balta-slava, pri kiu oni supozas, ke ĝi estas la plej malfrua branĉo, restis lingvistika hipotezo. Koncerne la ekzakta klasifiko de la konataj lingvoj, ĝi varias laŭ la aŭtoroj. F. Bopp volis enfermi la kaŭkaziajn dialektojn en la hind-eŭropian. R. Bask difinis ian «skitan» familion, kiu entenis la finno-ugran, la samoqedan, la turkan, la mongolan, la tunguzan, la eskiman, la baskan, la kaŭkazan kaj la dravidan...!

Aliflanke la amerika lingvisto C. Massica, farante la liston de la 30 karakteristikoj de la hindia, montras, ke la strukturaj similaĵoj estas pli fortaj inter tiu ĉi hind-eŭropa lingvo kaj aliaj, nehind-eŭropaj lingvoj, kiuj estas geografie pli proksimaj (la dravidaj lingvoj kaj la japana), ol inter ĝi kaj la malproksimaj hind-eŭropaj lingvoj.

E. Benveniste elektis kiel familian kriterion la sociajn instituciojn prefere al la gramatiko. Tiel li malkovris komunajn trajtojn: ian patriarkan parencecan sistemon, la regan funkcion ligitan al jura funkcio, la komercan vortaron, ktp.

Sed kiel rimarkas Demoule, «por esti certa, ke la malkovritaj strukturoj estas specife hind-eŭropaj, oni devus kontrasti ilin al nehind-eŭropaj socioj, vivantaj en sama epoko en la sama geografia regiono kaj kun komparebla grado de socia komplekso». Tio tute ne estas la kazoo.

La hipoteza «kurgana» kulturo deriviĝas de la nomo kiun la popoloj de la stepoj donas al siaj tombomontetoj. Ĝi karakteriziĝas cetere per la ĉaro (la radiko «vegh» de la komuna hind-eŭropa vortaro), la plifortigita urbo (radiko «plas», kiu donis la grekan «polis» (urbo)) kaj la hakilo (pelekus, parasu). La semitoj, la sumeroj kaj la finn-ugroj ankaŭ havas la ĉaron, kaj plifortigita urbo ekzistas en la Mez-Oriento, dum la vorto por hakilo certe venas de la sumera «balag». La Ĉinio de la 3-a jarcento a.K. ankaŭ havis ilin kaj oni konservas tie ankoraŭ ĉiam la tradicion de la tombomontetoj.

Koncerne la ekzisto de komuna strukturo inter la mitoj de la diversaj hind-eŭropaj popoloj, kiel montris G. Dumézil, ĝi ne implicas etnan specifecon, tiom pli ĉar A. Yoshida kaj T. Obayashi montris okulfrapajn similecojn inter la plej antikva japana panteono kaj la rekonstituita hind-eŭropa panteono.

Tiel kelkaj inteligentaj rimarkoj sufiĉus por nenigi la tezon de la hind-eŭropanoj, kaj do ankaŭ de ilia lingvo: ju pli la komuna origino ŝajnas evidenta je la unua rigardo, des pli ĝi ŝajnas malaperi, kiam oni proksimiĝas al ĝi. La respondo de J. Haudry estas signifa tiurilate, tiel per siaj postulatoj kiel per sia fragileco:

La elirpunkto estas tio kion de Saussure nomis la arbitreco de la lingvistika signo... Se estas nenia natura ligo inter la franca koncepto «père» kaj la koresponsa vorto en iu ajn lingvo, la konkordanco inter la latina «patro», la greka «pater», la sanskrita «pitā» ktp., postulas racian eksplikon. Fojfoje oni hezitas inter depruntaĵo kaj heredajo por iaj vortoj, sed kiam temas pri gramatikiloj kiel la finaĵoj de la substantivoj kaj verboj, la sufiksoj kaj la prefiksoj, la hipotezo de depruntaĵo povis esti eliminata. Temas do pri komuna heredajo... Tio estas la kutima evolu skemo: iu komuna lingvo dialektiĝas, la dialektoj diverĝas, iuj el ili fariĝas komunaj lingvoj, kiuj siavice dialektiĝas, diverĝas, ktp. La ekzisto de lingvo implicas tiun de ĝiaj parolantoj. Uzata singarde kaj kritike la lingvistika paleontologio permisas formi versajnan kaj ĉiam korekteblan tabelon de hind-eŭropa civilizo, kiun oni devas identigi sur unu el ĝiaj geografiaj lokoj, konataj de la prehistoria arheologio.

Eĉ formulita en konvinka tono, la argumento de aŭtoritato valoras nenion en la sciencia debato. Postulatoj postulas justigajn faktojn, sed ni ne povas dubi pri la lucideco de tiuj sciencistoj kaj profesoroj, nek pri la graveco de la daŭrigo de tiu studio pri tiel malforte subtenata tezo.

Malgraŭ ĝia nekohereco, la hind-eŭropa popolo trovigas en niaj lernejaj libroj kaj enciklopedioj. Oni do ne povas abandoni ĝin al ĝia neekzisto sen defendi ĝian gravecon kaj sen esperi, ke iam naskiĝos la ĝermo de klara kaj realisma teorio pri la origino de la lingvoj. La unua paŝo devas esti reiro al la tereno de la etimologio kaj rigardi trans la artajn limojn de la hind-eŭropa mondo. Ekzemple la bretona kaj la angla havas gramatikan sistemon tiel malproksiman de la sanskrito kiel de la ĉina. Kontraŭe la kanura, lingvo parolata en la centro de Afriko, posedas verajn deklinaciojn.

En 1938 Gaudiche faris liston de 100 asiriaj vortoj kiuj multe similas al la francaj kontraŭpartoj. Ni citas kelkajn el ili:

adiri	adorer (adori)	kararu	courir (kuri)
kadu	cadeau (donaco)	gurus	gros (dika)
karatu	court (kurta)	latu	lutter (lukti)
kafir	chèvre (kaprino)		

Kia paradokso! Iuj sciencistoj serĉis kun malespero polon en Ukrainio kiun oni povis nomi hind-eŭropa, kaj jen ke inter Ĥaldeo kaj Egiptio antikva popolo manipu-

lis hind-eŭropajn vortaron! Tiу parentece kun la antikvaj mediteraneaj lingvoj estas jam de longe konata. Jam en 1828 en siaj «Observoj pri la radikoj de la semitaj lingvoj» M. Klapproth aperigis komparan liston de hebreaj, arabaj kaj sanskritaj radikoj. Jen ekzemplo:

#### Kat (mortigi, tranĉi)

→ <b>araba</b>	K'atta, K'attaba	tranĉi
	K'atama	mordi
	K'adda	tranĉi en la longeco
→ <b>hebra</b>	Qatal	mortigi
	Qatab	tranĉi
→ <b>sanskrita</b>	K'had	mortigi, vundi
	Kut'h	mortigi
	Kutt	tranĉi

Kaj tiu samtempulo de Schlegel kaj Bopp signalis ankaŭ la anglan *to cut* (tranĉi), la persan *kouchten* (mortigi) kaj la turkan *kes-mek* (tranĉi), kiuj apartenas al la sama radiko. Oni do ne atendis la skolon de Heidelberg por malkovri radikojn komunajn al pluraj grandaj lingvistikaj familioj.

Tiu fakteto povus esti eksplikata per la semantika valoro de la diversaj sonoj. Tio estis cetere la interpreton de Schlegel mem. Por li la homo origine estis sentema al la fundamenta signifo de la sonoj, al la natura valoro de la literoj kaj silaboj. Li trovis la rilaton inter sono kaj ideo. Sed Bopp renoncis al tiu hipotezo. Ekde 1832, en sia «Gramatiko komparita» li deklaris: «Estas nur la mistero de la radikoj aŭ, en aliaj vortoj, la kaŭzo kial iu primitiva koncepto estas ligita al iu sono kaj ne al alia.» Metante kiel principon la arbitron de la signo aŭ, se paroli kiel tiuj aŭtoroj, la foresto de rilato inter signifanto (la vorto) kaj signifato (la senco), la universitata lingvistiko provis ekspliki la lingvajn faktojn sen iam kompreni ilin. Kaj kiam malfruaj skrupuloj restarigis iun semantikon, eĉ iun semiologion, oni volis vidi en la signifo nur socian konvencion konsekritan de la kutimo. Sed kial tiu senco, eĉ konvencia, ligis sin al iu grupo da literoj prefere al alia? Jam preskaŭ du jarcentoj oni ne kapablas klarigi tiun fenomenon.

Post rapida progreso inter 1830 kaj 1880 la historia lingvistiko komencis piedfrapetadi. Oni tamen nur turniĝis en rondo. Saussure, la fondinto de la moderna lingvistiko, jam antaŭsentis tion. Oni ne sufiĉe rimarkigis, ke li rifuzis publikigi sian faman «Cours de Linguistique Générale» (Generalan Lingvistikian Kurson). Necesis rekonstitui ĝin post lia morto helpe de la notoj de siaj studentoj (1975). Sed oni ne sufiĉe komprenis, kiom li dubis pri siaj proprej principoj. Tial li skribis en 1894 al Antoine Meillet: «Mi abomenas la malfacilaĵon kiun mi ĝenerale havas por skribi nur dek prudentajn liniojn pri lingvaj faktoj. Tio finiĝos malgraŭ mi per libro, en kiu mi eksplikos sen entuziasmo, kial ne estas unu termino uzata en lingvistiko al kiu mi donas ian sencon.»

La zorgo ricevi la neelcerpeblan riĉecon de la lingvistiko faktoj devigas nin rifuzi kaj la postulaton de Saussure kaj la tutan teorion de la hind-eŭropa etno, kiu fondiĝis sur li. En siaj «*Observoj*» de 1828 Klaproth jam komprenis, ke la radikoj de ĉiuj lingvoj estas unusilabaj. Oni devas tamen koncedi, ke la sono kaj la senco konspiras. La riĉaj perspektivoj kiujn ofertas la postulato

de la absoluteco de la signo permesas al ni forlasi sen bedaŭro kaj eĉ kun malpezigo tiun fantasmagorian hind-eŭropian antaŭulo kun liaj nordaj nebuloj, liaj siberiaj potoj kaj lia himalaja akcento.

(D. Tassot, el la revuo *Science et Foi*)

## LA SENGLORA REGRESO DE LA VALONA LINGVO

«*A jou di pih so ti tchâsseûtes! Quelle afère!*» resonas el la drinkejo la stertoranta ridego de maljunulo. La mezuma aĝo de la klientoj troviĝas super sepdek jaroj. «*Attention de ne pas pisser sur tes chaussures!*» tradukis al mi alia regula kliento. Tradukita en Esperanto: «Atentu, ke vi ne pisu sur viajn ŝuojn!»

La *Café du Centre* (Drinkejo de la Centro) estas unu el la plej malgrandaj drinkejoj de Namuro. Estas ankaŭ unu el la malmultaj kafejoj, kie la klientoj parolas preskaŭ ekskluzive valone inter si. Estas la kutima kafejo de la organizo *Royale Moncrabeau de Namur* (reĝa asocio Moncrabeau de Namuro), foklora asocio, kiu defendas ekde 1843 la valonan patrimonion. «Kiam ni konvenas, ni parolas nur valone,» diras dekano De Vos, dum li trinkas bluan bieron de Chimay. «*Li Walon, c'est nosse lingade* (la valona estas nia lingvo.) La valona estas multe pli suka ol la franca. Provu rakonti maldecan ŝercon en la franca: tio ne sukcesas.

«Kvankam la valona kaj la franca similas unu al la alia, ili havas malmultan komunan,» certigas Michel Francard, profesoro de franca lingvistiko en la universitato de Louvain-la-Neuve. «Tute kiel la franca la valona devenas de la latina, sen esti franca dialekto. Tamen estas grandaj diferencoj. En multaj dialektoj ne estas diferenca inter viraj kaj virinaj artikoloj. Ankaŭ la vortordo diferencas. En la valona la adjektivo staras antaŭ la substantivo, dum en la franca ĝi staras plej ofte post la substantivo.»

Sur la stratoj la valona estas revenanta. Tiamaniere multaj namuraj kafejoj gluis sur sia antaŭa glaco la devizon *Po bwère, gn-a nin dandjî d'coutia* kun la tradukon en la franca: «Pour boire, pas besoin de couteau (por trinki vi ne bezonas tranĉilon)». Ankaŭ dum la valonaj festoj ĉuijare komence de septembro la lingvo ricevas multan atenton, kiel interalie la frumatena meso en la valona.

De Vos prezentas al mi Jean-Pierre Lamy, reĝisoron de Tine Briac [pron. Briak], teatra trupo kiu ludas ĉuijare du teatraĵojn en la loka dialekto. «Fariĝas ĉiam pli mal-facile trovi geaktorojn, ĉar la gejunuloj parolas ĉiam malpli la valonan,» li eksplikas. La teatraĵoj tamen restas tre popularaj. La prezentoj ĉiam altiras plenajn sa-

lonojn.

Malgraŭ la multaj iniciatoj la valona ne fartas bone. Francard taksas, ke maksimume 10% de la valonoj (t.e. proksimume 300.000 personoj) ankoraŭ scipovas la valonan. Li pensas, ke la lingvo havas malbonan estontecon. «Mi pensas, ke pli ol la duono de tiuj parolantoj havas pli ol sepdek jarojn. La valona estas do laŭlitere formortanta».

Iam la situacio estis tute alia. Antaŭ cent jaroj la valona estis la plej multe parolata lingvo de Valonio. Laŭ la lingva nombrado de 1920 80% de la loĝantaro parolis ankoraŭ ĉiutage la valonan. Ankaŭ la pikarda (en la regiono de Mons (Bergen) kaj Tournai (Doornik), la lotaringa (en la regiono de Gaume) kaj la ĉampina en la vilaĝo Vresse-sur-Semois) iam estis la plej uzataj regionaj lingvoj. La franca estis, kiel en Flandrio, la lingvo de la administracio kaj de la plej alta socia klaso.

La granda kulpulo pro la perdiĝo de la valona estas la deviga elementa instruado, diras Francard. Ekde 1920 la valonaj infanoj estas instruataj nur en la franca, kiu estis kondiderata kiel la lingvo de la progreso, kaj tial ĉiuj lokaj lingvoj devis malaperi. La instruistoj eĉ ofte vizitis la gepatrojn por konvinki ilin ne plu paroli la valonan kun siaj infanoj. Tiu politiko estis terure efika. En malpli ol kvindek jaroj Valonio fariĝis praktike komplete unulingve franca. «Ĝis en la okdekjaroj de la antaŭa jarcento la uzo de la valona en la lernejoj estis severe malpermesita. Mi ofte estis punata, ĉar mi parolis valone,» rikanis Lamy. «Kiam mi ne lernis mian lecionon, mi ĉiam respondis en la valona. Tiam mi devis forlasi la klason, sed mi tamen ne perdis poentojn.»

Kvankam la nombro de la valone parolantoj regresas ĉuijare, la interesoj pri la lokaj dialektoj kreskas. En Namuro ekzistas ekde 1997 la *Scole di Walon* (lernejo de la valona), kie oni instruas la valonan en vesperklasoj. La infrastrukturo de la lernejo respegulas la tristan staton en kiu la lingvo troviĝas hodiaŭ: altaj plafonoj, gisaj radiatoroj, flavgrizaj senkolorigintaj muroj kaj supozo de ĉeesto de asbesto. La plimulto de la lernantoj estas pli ol sesdekjaraj. La kursoj estas tamen tre popularaj. Ĉi-jare estas 26 novaj lernantoj, tiel ke la grupo devis

est dividita en du klasojn. La lecionoj okazas sammaniere kiel ĉiuj lingvolecionoj, kun tiu diferenco, ke multaj lernantoj jam pli-malpli posedas la lingvon. «Mi sekvas la lecionojn precipe pro nostalgio,» diras Jean-Pierre (58). «Mi ofte aŭdis miajn gepatrojn paroli la valonan, sed mi neniam lernis ĝin antaŭe. Mi esperas povi lerni ĝin nun.»

Pierre, la sola dudekjarulo en la klaso, sidis tie iomete konfuzita. «Mi komprenas nenian valonan vorton. Eĉ miaj geavoj neniam parolis la valonan.» Li tamen esperas iomete lerni la lingvon dum la kurso. «Ni tiom klopojas konservi niajn malnovajn konstruaĵojn, sed tio ĉi estas pli grava. Mi esperas, ke la lernado de la valona povos helpi min kontribui al la konservado kaj restaŭrado de la valona patrimonio. Ni tro longe konsideris la valonan kiel ion negativan. Mi fieras pri nia kulturo.»

Malgraŭ la kreskanta interesigo, la aŭtoritatuloj entreprenas nenion por promocii la valonan. Unu el la mal-

oftaj politikaj defendantoj de la valona estas Marc Bolland, la PS-urbestro de de la lieĝa komunumo Blegny. Kiel membro de la valona parlamento li proposis en 2013 reenkonduki la valonan en la francaj instruadon. «Mi ricevis multan apogon, sed mi timiĝis pro la vere agresivaj reagoj el Bruselo kaj Valona-Brabanto,» rakontas Bolland. «Ili trovis, ke mi subfosas la belgan ŝtaton, dum mi nur petas atenton pri la kompatinda stato en kiu troviĝas la regionaj lingvoj.»

«Tiu obstina sinteno kontraŭ la lokaj lingvoj havas ĝis hodiaŭ katastrofajn efikojn,» pensas Francard. «Ni tiom provis paroli puran francan lingvon, ke ni tenis nin for de ĉiuj aliaj lingvoj. Eĉ hodiaŭ multaj valonaj gejunuloj esas malmulte motivitaj lerni aliajn fremdajn lingvojn. Ni ankoraŭ estas konvinkitaj, ke la franca sufiĉas al ni. Mi estas certa, ke la valonoj pli enuis lerni fremdajn lingvojn, se ni ne estis forjetintaj la valonan.»

(El la revuo *Knack*)

## DE DUITSTALIGEN VAAK VERGETEN !

«De Duitstaligen worden door de Waalse regering nog altijd te vaak vergeten, » dat zegt het Oost-Belgische lid van het Waalse parlement Jenny Baltus-Möres in een interview. «Ik heb de ervaring opgedaan dat men als Duitstalige zijn probleem zeer duidelijk en vaak moet herhalen eer er iets gebeurt,» zegt de 33-jarige dame in een gesprek. «Ik zie mijzelf bij mijn werk in het regionale parlement vooral in een preventieve rol. Als een nieuw decreet wordt besproken, moet men eerst onderzoeken of men daarbij ook aan de Duitse taal en de belangen van het Duitstalig gebied heeft gedacht. Dat wordt nog altijd veel te vaak vergeten. Zo zijn er bijvoorbeeld diensten van het Waalse gewest die in het Duitstalig gebied geen afdeling of zelfs geen Duitstalige gesprekspartner hebben, wat een discriminatie is ten opzichte van onze burgers,» aldus mevrouw Baltus-Möres. «Die benadering blijft niet beperkt tot taalkundige problemen. Het is ook problematisch dat veel dingen in Namen eerder vanuit een stedelijk standpunt worden bekeken en georganiseerd. Met de landelijke structuur van het Duitstalig gebied wordt geen rekening gehouden..» Zij zelf voelt zich in Namen geen buitenbeentje, maar toch als een exotische. «Twee Duitstalige afgevaardigden in een groep van 75 zouden wel sneller opvallen.»

## ESPERANTO POR VIA SEKURECO DUM LA FLUGO

Mi estas animanto de la labora grupo de Esperanto pri aviado. Mi lancas tiun alvokon en la esperantan komunumon por montri, ke Esperanto povas esti bona solvo por grava aviada problemo. Fakte, mi mem laboris dum 39 jaroj en la aviado, kaj mi povas certigi al vi ĉiuj, ke la angla lingvo, kiun oni trudas al ni, povas esti danĝera. La angla kaŭzis pli ol unufoje mortintojn. Mi ricevis ĉiutage metrojn da papero anoncantajn flugajn akcidentojn kaj incidentojn, des pli ke la aviadaj inĝenieroj plendis, ke tiu lingvo kaŭzas al ili problemoj. Ankaŭ al la pilotoj. Do, mi alvokas ĉiujn esperantistojn subteni min. Mi estas preta skribi rekomandan leteron al ICAO. Tiuj kiuj volas, povas sendi al mi siajn nomojn kaj la nomon de sia lando. Mi petas vin ĉiujn, sendi al mi la adresojn de la ministerioj kiuj respondecas pri la civila aviado en via lando, kaj eventuale la adresojn de la pilotaj sindikatoj de via lando. Mi bezonas tiujn informojn. Estas absolute necese, ke ni igu adopti alian pli facilan lingvon en la aviado: Esperanton. Jen miaj adresoj : [elisabeth.lambert935@orange.fr](mailto:elisabeth.lambert935@orange.fr) kaj [elisabeth1949@outlook.fr](mailto:elisabeth1949@outlook.fr)

(Elisabeth Lambert, Francio)

## LA SKARLATA ARMILO

Brazila ĵurnalistino, dokumentaristino kaj aŭtorino de portugallingva sukcesromano «A Arma Escarlate» (La Skarlata Armilo), naskita en 1985 en Rio-de-Ĵanejro, Renata Ventura, iutage malkovris Esperanton kaj lernis ĝin en kvar monatoj dum restado en Houston, Tek-saso, U.S.A. Si konsideris, ke la scipovo de Esperanto malfermis al ŝi multajn pordojn, kaj ke ĝi multe pli ol antaŭe stimulis ŝian scivolon pri aliaj kulturoj kaj aliaj landoj. En kelkaj monatoj ŝi havis amikojn en la tuta mondo, kaj ŝi ekpartoprenis naciajn kongresojn, kie oni parolas nur Esperante.

En 2006 ŝi realigis la dokumentaran videon «Bionika», uzante bildojn, kiujn ŝi mem registris dum kongresoj de Esperanto, kaj tiamaniere ŝi lude respondis al komento de la verkisto Carlos Heitor Cony, kiu en radio-elsendo, ne celante malutili, kritikis Esperanton, nomante ĝin «bionika». Fine de la produktado Renata ricevis tre belan deklaron de la verkisto, kiu konfesis, ke li estis impresita de la nombro da repostoj, kiujn li ricevis post sia komento tra la radio: «Neniam kroniko kaŭzis al mi tiom da samtempaj problemoj. Do multaj letero de ho-

moj, kiuj diris, ke ili apartenas al asocioj aŭ fakultatoj, homoj kiuj ĉiutage parolas Esperanton hejme, en sia laborejo... Sincere dirite, mi ne sciis tion. Mi ne aljuĝis al Esperanto tiel grandan kaj universalan gradon de disvastiĝo, ne nur en Brazilo, sed tutmonde!»

Renata Ventura havas multajn projektojn, precipe kvin-voluman sekvon al sia romano kaj dokumentarajn filmojn. La granda surprizo de Renata okazis al 29an de januaro 2016, kiam la brita ĵurnalo The Guardian entuziasme recenzis ŝian libron, bedaŭrante nur, ke ĝi ankoraŭ ne estas tradukita en la anglan. Kontraŭe al «Harry Potter» de J.K. Rowling, ŝi preferas la antiheroon Hugo Scarlet, la ĉeffiguron de sia romano: «Hugo havas tian potencialon fariĝi bona persono, kiun ni aklamas ĉiufoje, kiam li foje sukcesas, kaj ni estas affiktaj ĉiufoje, kiam li malsukcesas, tio ne nur por li, sed ankaŭ por miloj da malriĉaj infanoj mizere vivantaj sur la stratoj de la mondo, kiuj estas pli realaj por ni.»

Ŝiaj dokumentaraj videoj «Bionika» rete videblas en la portugala kaj parte en Esperanto.

(Henri Masson)

La ĉi-jara **101a Universala Kongreso de Esperanto**, la plej grava okazaĵo de la esperantista jaro, okazos en la urbo Nitro en Slovakio. Ĉu vi demandas kial veni al Slovakio por la 101a UK?

- Historie unua UK en Slovakio.
- Ekologia kongreso (Eŭrope atingeblas trajne, buse, aŭte, ene de la urbo oni ne bezonas urban trafikon, ĉio kongresrilata estas ene de pieda distanco de 1 km).
- Ekonomia kongreso (la tranoktado-prezoj ekas jam ĉe 7 EUR/nokto, tagmanĝkostoj en restoracio: 3,50 EUR, biero: 1 EUR).
- Nitro estas relative malgranda urbo, danke al kio Esperanto kaj la kongreso estos tre bone videblaj.
- Gastamo kaj gastronomio.
- Eblo malkovri Slovakion (landon meze de Eŭropo, kun tre riĉa historio).
- Nova jarcento de kongresoj (modernigo, novigo de la plej granda Esperanto-kongreso).
- Riĉega junulara programo (Nepre indos ĝin partopreni).
- Riĉa kultura kaj faka programo

Ĉi-jara kongressa celo estas agi ekstermovade kaj malfermi nian movadon al la mondo. La 101a UK okazos en la tempo, kiam Slovakio prezidos la Konsilion de EU (julio – decembro 2016). Dum la 101a UK la 23–30an de julio 2016 okazos kvar malfermitaj fakaj aranĝoj:

1. Lingvo-politika konferenco de Višegradaj landoj V4+ “Perspektivoj de lingva komunikado en EU”.
2. Internacia entreprenista kaj komerca forumo “Investi en koro de Eŭropo – investi en Slovakio”.
3. “Inter-religia renkontiĝo” de reprezentantoj de diversaj religioj.
4. La 20a Internacia Medicina Esperanta Kongreso.


Se vi ne trovis en la listo “la vian” kialon, volonte informu nin pri tio: lkk@esperanto.sk

Pliaj detaloj pri la 101a UK troviĝas ĉi tie: <http://www.nitra2016.sk/>

<https://www.facebook.com/uk2016>

<http://www.uea.org/kongresoj>

# UMBERTO ECO



Op 19 februari overleed de Italiaanse auteur Umberto Eco, die bij ons vooral bekend geworden is met zijn roman *De naam van de roos*. Hij heeft echter ook heel wat wetenschappelijk werk gepubliceerd. Eén van zijn boeken, *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*, is in het Esperanto verschenen als *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo* (zie <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5042>). Over de Nederlandse vertaling Europa en de volmaakte taal werd in *Horizon-taal* destijds de volgende recensie gepubliceerd.

## Naalden in de hooiberg

Het boek van Umberto Eco, Europa en de volmaakte taal, is met grote belangstelling in de Esperantoweereld ontvangen, niet in het minst, omdat Eco, tijdens het schrijven van dit boek, zich ook in het Esperanto heeft verdiept en zich a.h.w. tot het Esperanto heeft bekeerd. Misschien is dat wat sterk uitgedrukt, maar hij heeft toch zijn oorspronkelijke sceptische oordeel verlaten, en is de mening toegedaan dat het Esperanto inderdaad een heel grote waarde heeft en ruimschoots de verwachtingen kan inlossen die het schept en het doel dat het nastreeft kan realiseren - tenminste zuiver taalkundig bekeken. Maar waarover gaat het boek?

Eco gaat op zoek naar alle pogingen die – sinds Babel – ondernomen zijn om de mens opnieuw één taal te bezorgen. Maar reeds hier rijst een eerste twistpunt. Is de taalverscheidenheid wel met Babel ontstaan? Een analyse van het Bijbelverhaal en een voorafgaand hoofdstuk leert dat er reeds vóór Babel taalverscheidenheid was. Waarom wordt er dan toch altijd aan Babel gerefereerd? Klaarblijkelijk interpreteerde men de taaldifferentiatie vóór Babel als het ontstaan van tribale dialecten, terwijl de gebeurtenissen bij Babel veroorzaakt werden door een goddelijke vloek.

Hoewel deze Bijbelse tegenstrijdigheid aanleiding geeft tot enige discussie, houdt ze onderzoekers niet tegen om op zoek te gaan naar de „perfecte” taal. Aanvankelijk gaat het om de zoektocht naar de eerste/oorspronkelijke taal, later om pogingen om een universele en perfecte taal te construeren. Het boek behandelt dus de geschiedenis van het zoeken naar die universele taal, vooral toegespitst op wat men in de Middeleeuwen en tijdens de Renaissance op dat vlak heeft gerealiseerd.

De zoektocht van de mensheid naar de universele en perfecte taal begint eigenlijk met de zoektocht naar de Eerste taal. Welke taal heeft Adam in het Aards Paradijs gesproken? Daarbij komt de bovenvermelde tegenstrijdigheid aan het licht, maar wordt ook duidelijk hoe de interpretatie van die verhalen en het denken over de aard van die eerste taal geleidelijk evolueert. Eerst heerst de opvatting dat Adam een volledige taal heeft gekregen. Daarna maakt de stelling opgang dat hij niet een taal kreeg, maar het vermogen tot taal, de mogelijkheid om de dingen te benoemen en zo een taal uit te bouwen.

Geleidelijk aan dwaalt dit zoeken van de eerste taal echter af. Godsdienstige overwegingen krijgen meer en meer de nadruk en „de eerste taal” wordt stilaan de taal tussen de mens, in casu de priesters, en God. Daardoor krijgt de „perfecte taal” stilaan de status van „geheime taal”. Op die manier kan de priesterklasse zich een superieure status en de daarbijhorende macht toe-eigenen. Als „geheime taal” wordt ze echter ook bruikbaar in de politiek. Van godsdienst verschuift de zoektocht naar het politieke vlak.

De godsdienstige „universele” taal had echter ook de bedoeling om correct met God te communiceren. Dit aspect van de taal eigenen zich de filosofen toe. Hen gaat het er daarbij niet meer om, om correct met God te communiceren, maar om correct, logisch en éénduidig te denken en de gedachten in taal vast te leggen. Deze filosofische taal krijgt meer en meer een wiskundige inslag. Ze wordt sterk symbolisch en krijgt ook de functie van brugtaal. Een tekst uit één taal, zou via de sterk formele (en dus niet spreekbare) taal perfect in een andere taal kunnen worden overgezet. Deze mathematische taal maakt gebruik van symbolen, cijfers enz. zodat ze niet als een in de dagelijkse omgang bruikbaar communicatiemiddel kan worden beschouwd. Denken wordt gelijkgesteld met rekenen en alles wordt dan ook in wiskundige symbolen vastgelegd. Deze projecten liggen aan de basis van de huidige zoektocht naar vertalen via de computer.

Het bespreken van alle afzonderlijke projecten heeft geen zin, daarvoor moet men het boek zelf lezen. Maar enkele krachtlijnen uit het boek presenteren is wel de moeite waard. Wat eerst en vooral opvalt, is dat veel van wat als moderne ideeën wordt beschouwd, reeds in de Middel-eeuwen aan bod kwam. Verder valt het op hoe vele van de principes van woord- en zinsbouw (morphologie en grammatica), die als universeel in het denken naar voren werden geschoven, in het Esperanto hun toepassing vinden. Uit deze geschiedenis blijkt echter ook hoe de wereld geleidelijk aan steeds complexer wordt, de wetenschappelijke verfijning steeds groter, en de mogelijkheden om heel die complexiteit in taal te vatten steeds moeilijker. Zo wordt de mogelijkheid van een universele taal steeds minder voor de hand liggend.

Het uitgangspunt van Eco is trouwens ook dat veeltaligheid een essentieel en typisch kenmerk van Europa is. De spanning tussen cultureel egocentrisme enerzijds en drang naar universalisme, oecumene en vrede zijn daarvan de belangrijkste karakteristieken.

Ten slotte nog twee punten om deze bespreking af te ronden. De oorspronkelijke zoektocht naar de universele taal vertrok vanuit het geloof dat de mensheid ooit één taal heeft gesproken. De hedendaagse zoektocht naar een universele taal is veel pragmatischer en gericht op de toekomst. De noodzaak om boodschappen tot ver in het nageslacht - duizenden en duizenden jaren lang - te bewaren, dwingt de mensheid als het ware zo'n taal te ontwerpen. Het voorbeeld van het gebied waar de Amerikanen hun kernproeven hebben uitgevoerd en dat voor tienduizenden jaren levensgevaarlijk radioactief besmet is, is daarvoor exemplarisch. Niet alleen de waarschuwing doorgeven, maar vooral ze ook doorgeven in een vorm die ook voor wezens die onze culturele achtergrond niet hebben - b.v. buitenaardse wezens - lijkt een onoverkomelijk probleem, omdat wij onszelf nu eenmaal niet los kunnen maken van onze culturele eigenheden. En omdat stappen of principes die voor ons logisch zijn, niet an sich logisch zijn. Ze behoren toe aan een systeem en men kan ze enkel logisch begrijpen als men het systeem kent. Maar hoe kan men de kennis van dat systeem doorgeven?

Laat ik nog even stilstaan bij de vraag of Eco aan het Esperanto zijn zegen geeft. Ongetwijfeld besteedt hij ruime aandacht aan het fenomeen Esperanto en beoordeelt hij het erg positief. Maar Eco is een wetenschapper. Zijn zoektocht naar pogingen en realisaties om een universele taal te ontwerpen, lijken doorheen gans het werk het utopische van de idee te onderstrepen. Wel is het jammer dat door slordigheden - gedeeltelijk in de vertaling, maar ook enkele van Eco zelf - nogal wat fouten in de Esperanto-voorbeelden voorkomen.

gvd

Umberto Eco, Europa en de volmaakte taal. Amsterdam, Agon, 1995. 368 p., Illus., 13 x 19.5 cm.

**Marjorie Boulton** (1924) estas angla aŭtorino, verkanta kaj en la angla lingvo kaj en Esperanto. Ŝia verkarbo ampleksas poeziaojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn. Krome ŝi tradukas. De la 27a de septembro 1953 ĝis la 8a de majo 1954, Marjorie Boulton kaj William Auld korespondis pošt-karte. El ĉi tiuj 'Rimletero' mi proponas unu poemon.

### LUNO

- 1 **Febre flavruĝa, froste pala,  
aŭ en nubranda aŭreolo,  
la ripetema, nebanala  
luno restadas amsimbolo;**
- 5 **mortaj vulkanoj, blankaj valoj  
ŝajnas, per mensa tajdotiro,  
la rigardanto de fataloj,  
la hipnotisto de sopiro.**

- 10 **Aliaj geomantaj ostoj  
sub tiu luno senpersona  
ripozas en aliaj frostoj,  
ostoj estintaj, senbezona...**

- 15 **Kaj multaj postvenontaj paroj  
kredos pri lunrigard' infane,  
en longaj, revobrilaj staroj  
sub sama luno, man'-en-mane.**

### MAAN

*Koortsachtig rossig, ijzig bleek,  
of in 'n omwolkte aureool,  
geneigd om zich te herhalen, (de) niet banale  
maan blijft een liefdessymbool:*

*uitgedoofde vulkanen, blanke dalen  
schijnen, door geestelijke "eb en vloed",  
de toeschouwer te zijn van lotsbestemmingen,  
de hypnotiseur van het verlangen.*

*Andere gebeerten van geliefden  
onder deze onpersoonlijke maan  
rusten in andere bevoren gronden,  
gewezen gebeerten, niet nodig...*

*En vele volgende paren  
zullen kinderlijk geloven in de manebliek,  
terwijl ze lang staan te kijken, vol schitterende dromen  
onder éénzelfde maan, hand in hand.*

### Versoj 1-2. Febre flavruĝa, froste pala, aŭ en nubranda aŭreolo,

Leginte la titolon, ni scias, ke ĉi tie temas pri la luno. Kiel la koloro de la luno povas esti tiom Ŝangīgema (variema)?

Ĉio dependas de la atmosferaj kondiĉoj ĉe ni, sur la tero.

Alia vorto por 'flavruĝa' estas kupra°. koper  
*letterijk: flavo + ruĝa = geelrood*

Kial 'febre' flavruĝa?

Bela kontrasto kun 'froste pala', varmo kaj malvarmo.

Eble febra kiel la amantoj mem?

Ni notu en verso unu harmoniajn son-grupojn:  
fe- bre / bre- fla - vru- fro- (aliteracioj).

Jen vortelekteto eble hazardo°. toevallig  
konstruita sed tamen rimarkinda.

### Versoj 3-4. la ripetema, nebanala luno restadas amsimbolo:

Kial la luno estas tia?

ripetema, ĉar la ciklo de la fazoj ĉiam ripetiĝas;

nebanala kvankam° oni vidas ĝin hoewel  
oftege° kaj jam de jarcentoj oni zeer dikwijs  
parolas pri ĝi.

Eble nebanala, ĉar ĝi restas, same kiel la suno, mistera?

Kial amsimbolo?

Eble diri ke la luno estas amsimbolo estas iom

troiga°? Geamantoj aliflanke ŝajnas overdreven  
ami promenadi en la lunlumo?

Kial la luno estas amsimbolo, kaj ne la suno?

La sunon pli ofte ni ligas°

verbinden

al energio.

Kial ĝi restadas amsimbolo, kun la sufikso -ad-?

por montri la ege longan periodon

### Resume pri strofo 1:

Ĉar ĝi estas tiom kutima, la luno povus impresi kiel banala, enuiga kaj tede° vervelend ripetema. Male, pro iaj kialoj la luno daŭre inspiras al ni tiun strangan senton pri amo.

---

### Verso 5. mortaj vulkanoj, blankaj valoj

Kio estas 'mortaj' vulkanoj?

Tiaj, kiaj ne plu erupcias°.

uitbarsten

Kion sugestas 'blankaj' valoj?

Neprofundaj, malfermaj, dolĉaj.

Jen notinda en ĉi-tiu verso bela son-harmonio!

### Versoj 6-7. ŝajnas, per mensa tajdotiro, la rigardanto de fataloj°.

Kion la poetino volas diri per la esprimo 'per mensa tajdotiro'?

iro = getrek; tajdo = getij, letterijk: getijdetrek

La luno kaŭzas la oceanan tajdon kaj nian humoron, kvazaŭ ankaŭ la homa menso konas

**SENPAGA programo (Vindozo)** kun tre vasta esperanta vortaro: Kompleta Vortaro kun ĉ. 2.800 ilustraĵoj. Vi trovas la vortojn en la kapvorta parto (17.000) aŭ en la alfabeto parto (55.000).

Krome oni aldonis pliajn vortarojn: esperanto-angla, nederlanda, franca, italiana, hispana kaj germana. La vortaro estas senpaga kaj povas senprobleme esti distribuita inter viaj esperanto-amikoj.

Sendu vian nomon al KVortaro@yahoo.com

La luno kaŭzas la oceanan tajdon kaj nian humoron, kvazaŭ ankaŭ la homa meno konas refluon kaj fluson ("ups-and-downs").

Jam de antikvaj tempoj la homo povis konsideri la lunon kiel okulon **rigardantan** la teron.

Laŭlitere, la komparo temas pri la homa emoj rigardi la lunon kiel misteran .. neiging

okulon kiu observas la teron.

Kial ni konsiderus la lunon tia?

La kontemplado de la luno ofte **logas** lokken nin al tiaj komparoj, ĉar ĝi jam de miloj da jarcentoj ŝajnas observi la **travivajon** de la homaro. wedervaren:

mensheid

Kio do estas tiu 'fatalo'?

Kp. PIV: Antaŭfiksita, neevitebla superega<sup>o</sup> leĝo<sup>o</sup> de la wet

okazontaĵoj<sup>o</sup> toekomende gebeurtenis

Kion supozigas la unua vorto: 'antaŭfiksita'?

Ke iu aŭ io antaŭfiksas tiun leĝon.

Kaj la vorto 'superega'?

Ke neniu leĝo povas esti pli forta.

**Verso 8.** la hipnotisto de sopiro.

Laŭ la vortaro **hipnotisto** kreas konscienco-staton, karakterizatan de alta sugestiemo<sup>o</sup>. sterke neiging tot het

suggereren

La hipnotisto manipulas niajn sentojn. Do, dank' al la influo de la luno, la deziroj estas/estus manipulitaj.

Notu: **hipnoti<sup>o</sup>** = troviĝi en **hipnota stato** (gehypnotiseerd zijn)

Oni hipnotigas/hipnotizas alian; oni metas alian en la hipnotan staton.

Kiel klarigi tian influon? beïnvloeding

Ofte la vido de la luno igas nin revadi pri tia stranga, ege mistera ajo kaj pro tio, aŭ dank' al tio, dum kelkaj minutoj, la luno vekas, nutras nian sopiron, nian deziron.

**Resume pri strofo 2.**

La luno estas por homo io mistera! Unuflanke ĝi estas senviva ajo, aliflanke la homo vidas ĝin kiel spektanto. Efektive, ĝi ŝajnas rigardi, eĉ observi la vivon sur nia tero. Pli eĉ: ĝi influas niajn dezirojn.

---

**Verso 9.** Aliaj geamantaj ostoj

Kial tiu aludo<sup>o</sup> al **geamantoj**?

verwijzing

Laŭdire<sup>o</sup> amantoj havas

naar men zegt

specialan ligon<sup>o</sup> kun la luno. Oni facile band povas diveni<sup>o</sup> kial!

raden

Aliaj ostoj?

Do temas pri mortaj geamantoj.

**Verso 10.** sub tiu luno senpersona

Senpersona = ?

Ĉu ne priloĝata<sup>o</sup> niet bewoond

Kie ni troviĝas en ĉi tiu verso?

Sur nia propra terglobo.

**Verso 11.** ripozas en aliaj frostoj,

Kie estus tiuj frostoj?

Ne nur en glaciaj landoj sed ankaŭ aliloke:

ili estas tutsimple enterigitaj ie ajan, kie vivo malestas<sup>o</sup> (forestas<sup>o</sup>) is afwezig

do kie ne estas ia korpa varmo .

**Verso 12.** ostoj estintaj, senbezonaj

Kiel kompreni 'ostoj estintaj'?

La ostoj daŭre plu ekzistas. Oni komprenu 'mortintaj ostoj', ili ne plu funkciias kiel 'vivantaj ostoj'.

Kial 'senbezonaj' ostoj?

Kp. PIV: senbezona = ne bezonata<sup>o</sup> niet nodig Estante mortaj, ili estas senutilaj. nutteloos

Jen notinda rilato: luno senpersona...

ostoj senbezonaj

kaj la muzikeco de tiu vortparo:

'ostoj estintaj' (agordo konsonantrimo).

**Resume pri strofo 3.**

La luno frida, senviva pensigas la poetinon pri la mortaj geamantoj. Per nova 'mensa tajdotiro' ŝi nun kondukas la leganton en aliajn 'blankajn valojn' sub tiu luno, alivorte: sur nia tero.

---

**Vs 13-14.** Kaj multaj postvenontaj paroj kredos pri lunrigard' infane,

'lunrigardo'?

Jen grava, esprimplena vorto pri tiu ege populara ideo, ke la luno **rigardas** nin.

Kial ni emas pensi tion?

Iel<sup>o</sup> la vido de la luno op één of andere manier povas sugesti al ni la bildon de rigardanta okulo.

La vorto 'paroj' referencas al kiu vorto?

Al geamantoj (verso 9) kaj al amsimbolo (verso 4).

Kial tiaj paroj kredas **infane**?

Enamiĝintaj paroj, kiel infanoj, ne kapablas rigardi la lunon objektive. Ili laŭdire emas<sup>o</sup> konsideri la lunon kiel ion vivantan.

**Vs. 15-16.** en longaj, revobrilaj staroj sub sama luno, man'-en-mane.

Kial tiuj paroj longe staras tie anstataŭ promeni?  
 Verŝajne ili estas kelkfoje vere impresataj<sup>o</sup> de la bela nokta spektaklo.  
 Pri kio ili povus revi? Ili eble amas poezie revadi pri la mistera beleco de la spektaklo, pri neatingebraj aŭ almenaŭ nun nur esceptokaze atingebraj celoj<sup>o</sup>... doeleinden  
 Eble ankaŭ ili emus<sup>o</sup> revi pri ia idealaj vivloko?

#### Resumo pri strofo 4.

En strofo 3 temis pri la pasinteco, nun temas pri la estonteco. Kvankam la luno perdis por la moderna mondo multe de sia mistera beleco, ĝi restos amsimbolo.

#### PLIAJ KOMENTOJ

##### La luno

1) Kio estas la fazoj<sup>o</sup> de la luno? *schijngestalte* La luno havas rondan formon, sed tiu ne ĉiam estas videbla de sur la tero. Kion ni povas vidi, tio estas la parto kiu en iu momento iĝas videbla al ni danke al la sunlumo: jen la tielnomata fazo de la luno.

2) Kio estas novluno<sup>o</sup>? *nieuwe maan*

Komenco de la unua fazo de la luno, kiam ĝi estas apenaŭ videbla, ĉar nur **etparte** prilumata de la suno.

3) Kiam videblas lunarko<sup>o</sup>? *maansikkel*

Kiam malpli ol lunduono estas videbla, inter la novluno kaj la unua fazo aŭ inter la lasta fazo kaj la novluno

4) Kaj kio estas lunĝibo<sup>o</sup>? *wassende/afnemende maan*

Jen fazo de la luno, kiam pli ol la duono kaj malpli ol la tuto de ĝia surfaco estas prilumata de la suno. Do, inter la unua duonluno kaj la plenluno, kaj inter la plenluno kaj la lasta duonluno.

5) Kiam ni diras ke estas plenluno?

Kiam la lunrondo estas plena, alivorte kiam la luno montras al ni sian tute plenan flankon.

Kiel oni povas informiĝi pri la ĉiutaga stato de nia natura satelito?

Kio estas luneklipso<sup>o</sup>?

*maansverduistering*

malapero kompleta aŭ parta pro trairo en la ombro aŭ duonombro de nia tero.

6) Kio estas lunatiko<sup>o</sup>? *maanziekte*

Homo ege kaprica kaj humorĉanĝa.

##### Kial tia nomo?

Pro la fakto, ke la luno daŭre ŝanĝigas.  
 7) Kio estas alluniĝi<sup>o</sup>? *op de maan landen*  
 Manovri por malsupreniri al ĝi kaj suriĝi sur ĝin.

Kio estas surluniĝo<sup>o</sup>? *maanlanding*

La alveno sur la surfacon de la luno de spac-veturilo<sup>o</sup>. *ruimteschip*

